



NEDERLANDA ESPERANTISTO

Monata Organo de la Nederlanda Esperanto-Asocio
„La Estonto Estas Nia” - 33-a jaro n-ro 12

Administranto: P. M. Mabesoone, Cort van der Lindenlaan 42, Harderwijk.
Tel.: 0 34 10 - 36 11. Jara abono por ne-membroj: gld. 5,50. Por membroj senpaga.

Redaktoro: H. Groendijk, Pontanuslaan 7, Arnhem. Tel.: 0 83 00 - 2 66 99.

KOMUNIKO PRI „LA MONDA LINGVO-PROBLEMO”

1. **Bezona kaj celo.** Ekde la fondigo de la Centro de Esplo-ro kaj Dokumentado (CED) en 1952, tiu institucio plenumis tre efikan laboron, liveris objektivan dokumentaron en multaj okazoj (Montevideo, 1954; 100-Jara Datreveno de la naskiĝo de Zamenhof, '59; Jaro de Internacia Kunlaboro, 1955-'66; Jaro de Homaj Rajtoj, 1967-'68, ktp.) al diversaj internaciaj kaj naciaj instancoj. Pluraj gravaj dokumentoj de CED aperis en multaj naciaj lingvoj. Malgraŭ tiu utila laboro, montriĝis, ke gravaj materialoj pri la lingva problemo en la mondo restas neutiligitaj en la arkivo de CED. Montriĝis ankaŭ, ke oni povus multe pli celtrafe atingi la ŝlosilajn poziciojn en mondaj kaj landaj kadroj per altnivela revuo, kiu prezentus la lingvan problemon en ĉiuj ĝiaj aspektoj: socia, lingvistika, jura, psikologia, ekonomika. Laŭ la propono de CED, la Estraro de UEA aprobis la ideon, sed necesis unue havigi la materian bazon de ĉ. 20.000 guldenoj, formi prestiĝan redaktan komitaton, trovi kompetentajn kunlaborantojn, solvi tutan aron da aliaj demandoj, inter kiuj tiu de eldonisto okupis gravan lokon.

La preparlaboroj komenciĝis en majo 1967 kaj el ĉiuj vidpunktoj kontentige finiĝis, tiel ke la unua volumo de la revuo aperos en 1969, sed la unua numero de tiu volumo tutcerte estos publikigita

jam la 10-an de decembro 1968, nome la tagon mem de la datreveno de la subskribo de la Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj.

2. **Redakta Komitato.** Ĝi estas internacia laŭ karaktero kaj konsistas el C. J. Adcock, G. Bárczi, C. C. Berg, E. A. Bokarev, A. Capell, V. Georgiev, Z. Klemensiewicz, I. Lapenna, B. Migliorini, M. Pei, G. Waringhien, E. Wüster. La ĉefredaktoro estas d-ro Victor Sadler. La membroj de la Redakta Komitato estas mondkonataj specialistoj en siaj respektivaj fakoj: psikologio, lingvistiko, antropologio, internacia juro, filologio, leksikologio, terminologio kaj dokumentado. Ĝis nun 32 konataj fakuloj jam verkis aŭ promesis verki studojn kaj aliajn kontribuojn por la revuo. La konsisto de la Redakta Komitato kaj de de la kunlaborantoj garantias enhavon de plej alta kvalito.

3. **Eldonisto.** La revuon eldonos la renomata firmao Mouton & K-io, Hago-Parizo, kiu jam eldonas tutan aron da elstaraj revuoj kaj verkoj. Ĝi aperados sub aŭspicioj de CED, kiu konservas la kopirajton de la titolo kaj de la tuta enhavo. La fakto, ke Mouton & K-io estas la eldonisto, donas al la revuo plian prestiĝon.

4. **Teknikaj detaloj.** Ĉiu numero havos 64 paĝojn en formato de 23 x 17 centimetroj; papero kaj kovrilo luksaj. La revuo aperados 3 fojojn jare, do ĉiun kvaran monaton. En ĝi aperados artikoloj, notoj kaj informoj pri ĉiuj aspektoj de la lingva problemoj, kiel indikas la subtitolo. La artikoloj estos verkitaj en diversaj naciaj lingvoj, laŭ la bontrovo de la aŭtoroj (angla, franca, germana, hispana, rusa k.a.), ĉiam kun ampleksa resumo en la Internacia Lingvo. Per tio oni atingos, ke la revuon povos abonati diversaj institucioj interesigantaj pri la demandoj traktataj en la revuo, universitato kaj fakultatoj, bibliotekoj, internaciaj organizaĵoj kaj similaj instancoj. Krome, pro la resumoj en Esperanto, ĝin povas abonati ankaŭ personoj ne sciantaj tiun aŭ alian nacian lingvon en la revuo, sed parolantaj la Internacian Lingvon. Fine, la resumoj en Esperanto ebligas al ĉiuj seriozaj studentoj kompari la ideojn en la originalo kun la resumitaj pensoj en la Internacia Lingvo. Laŭ sia karaktero la revuo estas unika en la mondo kaj sendube la plej elstara iam publikigita ekde 1887, kiam aperis la verko de Zamenhof.

5. **La unua numero.** Kiel dirite, la unua numero aperos la 10-an de decembro 1968. Ĝi enhavas jenajn kontribuojn: Victor Sadler: Editorial; Ivo Lapenna: La situation juridique des „langues officielles” avant la foundation des Nations Unies; Arthur Capell: The limits of second language learning; J. B. Rudnyckij: Linguizid; Ein Beitrag zur Soziolinguistik; M. Van Haegendoren: The origins of the language shift in Flanders; Théodore Gutmans: L'interprète de conférence dans le monde moderne; R. L. Harry: The language problem in diplomacy. Al ĉiu artikolo estas aldonita ampleksa resumo en Esperanto. Tiu ĉi numero, krome, enhavas plurajn mallongajn informojn kaj notojn pri la aŭtoroj.

6. **Abonprezo.** La karaktero de la revuo kaj la ekstera aspekto kaŭzas, ke la kostoj de produktado estas relative altaj. Malgraŭ tio, la abonprezo estas relative malalta. Ĝi estas por unu volumo, nome

por la jarkolekto 1969 de 3 numeroj po 64 paĝoj; 25 guldenoj; 7 USA-dolaroj; 2-18-0 anglaj pundoj; 34 fr.fr.; 28 DM aŭ egalvaloro. **Oni povas abonati la revuon aŭ ĉe CED, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando; aŭ ĉe Mouton, Postbus 1132, Den Haag, Nederlando.** CED aparte atentigas, ke la Fondaĵo kolektita por la revuo garantias ĝian regulan aperadon dum minimume 2 jaroj. Tio estas la minimuma celo. Komprenoble, se la nombro de abonantoj estos kontentiga, la revuo aperados ankaŭ post tiu minimuma kaj garantiita periodo.

CED estas konvinkita, ke la revuo efike plenumos la taskon, por kiu ĝi estas eldonata. CED esperas, ke ĉiuj seriozaj studentoj de la problemoj ne nur abonos la revuon, sed ankaŭ vaste utiligos la materialojn, kiujn ĝi publikigos, por prezento de la lingvo-problemo en la hodiaŭa mondo sur scienca nivelo. Necesas atingi, ke la revuo troviĝu en ĉiu pli granda biblioteko, en ĉiu iom grava universitato, en institutoj pri lingvoscienco, filozofio, politiko, juro, ktp., ĉar nur tiamaniere povos esti atingita la celo. La personoj, kiuj laboras en tiaj institutoj aŭ institucioj postulu, ke ili abonu la novan revuon. Kun la helpo de ĉiuj, kiuj komprenas la eksterordinaran gravecon de la nova periodo, ĉi tute certe baldaŭ ekludos sian pozitivan rolon.

Helsingör

La internaciaj feriaj Esperanto-kursoj de la venonta somero okazos **20.-26. de julio en La internacia Atlernejo de Helsingör.** Venu por ĝui belan ferio-semajnon en vere Esperanta rondo. Prospekto senpage havebla ĉe

L. Friis,
Ingemannsvej 9,
ABYHÖJ
DK-8230 - Danlando

N.B. Speciala karavano el Helsingör al **UK en Helsinko** estos aranĝata. Ekiru 26/7 matene, alveno al Helsinko tagmeze.

ASOCIAJ INFORMOJ

KOMUNIKO DE LA ESTRARO

AL LA SEKRETARIOJ DE NIAJ SEKCIOJ

Kiel vi sendube scias, la laboroj por la realigo de la „komuna gazeto” bone progresas.

Laŭ la nunaj perspektivoj la unua numero aperos la 15an de januaro 1969.

Tutcerte vi konscias ke la apero de tiu-ĉi komuna gazeto estas „mejloŝtono” de la Esperanto-movado en nia lando.

Ni ĉiuj devas klopodi preni el ĝi kiel eble plej multe da utilo. Unualoke ĉiuj nederlandaj organizitaj esperantistoj estos informataj pri la vivo kaj agadoj de la aliaj organizaĵoj.

Krome ni devas ne neglekti ke la scio pri la vivo, strebado kaj sukcesoj de niaj fratsekcioj de L.E.E.N. estas ankaŭ tre grava. Tial ni apelacias al ĉiuj sekretarioj de niaj sekcioj zorgi ke ĉiun monaton raportoto pri la agadoj de la respektivaj sekcioj aperos en la rubriko de L.E.E.N. en la nova gazeto. Ĉiu okazaĵo, estinta aŭ estonta, kiu kelkfoje ŝajnas sensignifa povas esti inspira por aliaj sekcioj.

Ĉar nia estraro ankoraŭ ne disponas definitive pri redaktoro ni petas vin provizore sendi ĉiujn komunikojn kaj informojn al la sekretariino de L.E.E.N., s-ino Heetkamp.

La Komuna Gazeto aperados je la 15a de ĉiu monato. Do, bonvolu sendi al ni viajn manuskriptojn **tajpitajn** ĝis la 26a de la antaŭa monato. Ni estos tre dankaj se vi atentos al tio-ĉi lasta.

Por la ĝenerala parto, pri la Esperantomovado, ĉu en Nederlando, ĉu en eksterlando, sendu komunikojn kaj informojn rekte al s-ro J. Calado, Vergeetmijnstraat 25 b, Rotterdam 12.

Ni esperas ke vi ĉiuj diligente kunlaboros.

Nia biblioteko

Oficistoj de la Universitata Biblioteko de Amsterdam nun intensive okupiĝas pri pretigo de la katalogo „Esperanto”, kiu aperos la sekvontan jaron.

Ni do havu ankoraŭ iom da pacienco. Oni ja bezonas multe da tempo por ekzakte redakti tian katalogon.

EL LA SEKCIOJ

Sekcio Zaandam

Sekr.: P. L. Takstraat 64.

Pli ol la duono de nia membraro regule partoprenas la distrajn kunvenojn kiuj okazas ĉiumonate je la dua lundvespero en la salono de la Doopsgez.-Weeshuis, Stationsstraat 6 en Zaandam, je la oka horo. Dum nia estonta kunveno, do la 9-an de decembro, ni informos pri la Zamenhofa tago.

Sekcio Groningen

Sekr.: Bosboom Toussaintstraat 21, Groningen 6.

Naŭ anoj de la sekcio Leeuwarden kaj 14 anoj de la sekcio Groningen partoprenis dum la semajnfino de la 12-a kaj la 13-a okt. pasinta en kunveno organizita de la esperanto-grupo en Bremen. Kune kun la sekcio Leeuwarden ni luis aŭtobuson, per kiu ni je la 12.30a horo atingis Clüversborstel, 35 kilometrojn preter Bremen. Kune kun la gegastigantoj el Bremen, Hannover kaj Hamburg ni gastloĝis en tiel nomata Schullandheim, kio estis favora cirkonstanco por formi kvazaŭ familion, ĉar ankaŭ la manĝadoj estis komunaj. Ni bone intermiksiĝis por ke ni estu devigitaj paroli Esperanton.

La programeroj estis variaj kaj altnivelaj. I.a. sabaton posttagmeze s-ro Ing. K. Meyer prelegis pri „Nuntempa konstruado”, dimanĉmatene s-ro D-ro K. Schüter pri „La lingvoj de la maŝinoj” kaj s-ro d-ro Kröger pri la lernejkonferenco en la Sonnenberg Germanujo en fino de septembro pasinta, ilustrita per diapozitivaj. Estis rimarkinde dum tiuj tri altnivelaj prelegoj, ke la prelegintoj tre glate kaj bonege regis la lingvon Esperanton, kvankam temis pri teknikaj temoj. Ĉio estis tre bone kompreniga en Esperanto. Dr. Schlüter faris la saman prelegon dum la nordgermana kongreso en Hannover. La distra vespero je sabato, dum kiu la tempo forflugis, estis tre agrabla. Multe la bremenanoj preparis por sukcesigi la vesperon: multajn ludojn, kantojn, diapozitivajn k.t.p. Sekcio Groningen prezentis kvizon. La ĉiufoja komuna kanto tre amike kaj forte ligis nin kaj nur je la 24-a horo ni enlitiĝis ne plu babillante . . .

Restis tamen tempo sabaton kaj dimanĉon por promeni en la belega ĉirkaŭaĵo kaj kelkaj eĉ frue ellitiĝis por promeni antaŭ la matenmanĝo.

Dankinte la gastigantojn pro la bone kaj bele organizita semajnfino ni adiaŭis ilin je la 16.30-a horo kaj revenis hejmen je la 21-a horo, la Leeuwardenanoj iom pli malfrue.

FRISA ESPERANTISTA RONDO

Sekr.: Goutumerdijk 18, Leeuwarden.

Vendredon la 18-an de oktobro S-ro Böttcher raportis pri la vizito de kelkaj Leeuwardenanoj kun pluraj Groningenanoj al la Esperanto-grupo de Bremen, kiu organizis en la „Schullandheim” en la vilaĝo Clüverborstel tre gajan kaj instru-atan semajnfino.

F-ino Steffering primeditis la ĝojigajn spertojn en sia pluveca libertempo. Sub sia pluvombrelo ŝi i.a. ĝuis promenon laŭlonge de la Vlist (Sud-Holando), vizitojn al la brilaj florentoj en Leiden kaj esplorojn en la botanikaj ĝardenoj de Leiden kaj Baarn kaj cetera migradon tra la urbo Utrecht, kie ŝi partoprenis kelkajn erojn de la Esperanto-kongreso de SAT.

Sabaton la 2-an de novembro prelegis ges-roj Bossong-Singer el Eindhoven pri siaj sinsekvaj vizitoj al Bulgario. Ili elektis tre interesajn temojn: la (iaman) monaĥejon riĉege ornamitan ĉiujaran en la Rila (altmontaro) el la 13-a jarcento kaj la unikan feston (je la 24-a de majo) honore al Kiril kaj Metodi, monaĥoj el Tessaloniki, kiuj projektis en la jaro 855 la slavan alfabeton. S-ro Bossong tre instrue enkonduke parolis pri la geografia, soci-ekonomia kaj historia aspektoj de la lando kaj s-ino Bossong spontanee, elokvente klarigis la multajn adminirindajn diapozitivojn. Bonega vespero:

F.E.R. reagos kun entuziasmo je la alvoko de la 2-a prezidanto de U.E.A. s-ro Eric Carlén pri la Internacia Semajno de Amikeco de la 16-a — 22-a de februaro 1969.

Sekcio Arnhem

Sekr.: Pontanuslaan 7, Arnhem 3.

Je la 29-a de oktobro nia sekcia prezidanto s-ro Woessink prelegis por ni pri sia vojaĝo al Sovetunio dum tiu ĉi somero.

Laŭ invito de korespondamiko en Riga li pasigis kune kun sia filo Leo en la ĉefurbo de Latvujio agrablajn feriotagojn. Ĉar en Sovetunio eksterlandanoj rajtas uzi nur kelkajn aŭtoŝoseojn, ne eblis veturi per propra aŭtomobilo al Riga. Tra Orient-Germanujo, Polujo kaj parto de Sovetunio oni veturis aŭtomobile al Minsk. De tie oni flugis aerplane al Riga, urbo kun pli ol 500.000 enloĝantoj. S-ro Woessink kaj la filo estis plej gastame akceptitaj de la gastigantoj kaj cetera havis agrablajn kontaktojn kun la tieaj Esperantistoj, ĉefe la gejunuloj.

La prelego estis ilustrita de koloraj diapozitivoj, kiuj donis bonajn impresojn pri Berlino, Varsovio kaj Riga.

Internacia aŭtunferia Esperanto-kurso en Aarhus 1968

Mia edzo kaj mi partoprenis la kurson organizitan de sinjoro Friis.

Estis por ni baldaŭ miraklo. Dum la tuta semajno ni parolis nur Esperanton, plej ofte kun eksterlandanoj, ĉar ĉeestis entute nur ses nederlandanoj.

Tio estas la maniero esprimi sin en la internacia lingvo. Post unu tago oni eĉ pensas esperantlingve.

Ĝi estis semajno de amikeco, kiun ni travivis en Aarhus! Gesinjoroj Friis estas veraj gepatroj por ĉiu kaj la aliaj baldaŭ estas gefratoj.

Oni povas elekti el tri kursoj, nome: unu por komencantoj, la dua estas konversaciokurso, kaj la tria estas la perfektiga kurso de sinjoro Moravec. Oni mem povas elekti kaj oni poste povas ŝanĝi. La lecionoj okazis dum la mateno. Ni multe lernis kaj ni ankaŭ multe ridis. Je la tagmezo ni manĝis. Oni mem povis elekti el la diversaj manĝaĵoj, kiuj staris sur longa tablo.

En la posttagmezo ni havis ekskursojn kaj en la vespero prelegojn k.t.p.

La lastan vesperon ni mem devis organizi programon. Ni havis nur unu liberan posttagmezon, sed la kunlaboro estis tiel perfekta, ke ni prizorgis bonan vesperon.

Estis bonega semajno en Aarhus, kiun ni neniam forgesos. Kiam vi havas la eblecon iri tien, vi ĝuos unu el la plej belaj semajnoj de via vivo.

Den Haag.

Truus van Woerden.

EKUMENA SEMAJNFINO en LEIDEN 12/13—IV—1969.

Jam nun mi atentigas je la **Ekumena Semajnfino por Esperantistoj** kiu okazos la **12an kaj la 13an de aprilo 1969a**, en la belega, interesa universitata urbo **LEIDEN**.

Ni kunvenos en la tre moderna belega junularcentro „Korte Vliet”, kiu enhavas du grandajn salonojn kaj 5 ĉambrojn kun 12 litoj kaj 1 ĉambron kun 16 litoj. La konstruaĵo situas pitoreske ĉe la „Vliet”, iom ekster la urba centro.

Por tagmanĝo, lunĉo, trinkaĵo kaj trankvilito ni nur bezonas pagi . . .

f 10,—.

Sed vi devas baldaŭ aliĝi. Mi nepre devas scii antaŭ la **1an de januaro 1969**, kiom da personoj venos. Venu **grandamase** por doni bonan impreson al la ne-Esperantistoj. Mi faros multan propagandon. Ne seniluziigu min.

La provizora programo estas:

Sabaton 12-4

- 10.00 h.: Alveno de la gastoj, kaftrinkado, preparo de la litoj.
- 11.00 h.: Oficiala malfermo.
- 11.15 h.: Prelego kun diskuto kaj demandoj. Temo poste anoncota.
- 12.30 h.: Interbabilado kaj manĝado de la kunportitaj buterpanoj.
- 13.30 h.: Libera horo por promenado laŭlonge de la „Vliet” aŭ babilado aŭ komuna kantado.
- 15.00 h.: Jarkunveno de KUNE, Ned. sekcio de K.E.L.I. Jarkunveno de Ned. Kat., ned. sekcio de I.K.U.E. Intertempe te-trinkado por gastoj de aliaj unuigoj, libera tempo por ekskursi. Leiden estas tre alloga urbo kun multaj sciindaĵoj, sed la sabata posttagmezo ne estas tre taŭga por vizito.
- 16.30 h.: preparo de la tablo, ekzerco por la vespera programo, senŝeligo de la terpomoj.
- 17.30 h.: varma tagmanĝo.
- 18.30 h.: reparejo de la salono, dum kelkaj vizitas la kuirejon, tre interese!

19.00 h.: alveno de la invititaj oficialuloj, i.a. la urbestro, la skabeno kaj kelkaj urbaj konsilantaroj kaj ĵurnalistoj.

20.00 h.: varia vespera programo kun teatraĵo, deklamadoj, kantadoj, muzikado kaj eble popoldancoj. Se vi povos mem kontribui ion al tiu vespero, bonvolu anonci vin ĉe mi.

22.00 h.: vespera edifo kaj fino de la tago.

Dimanĉon, la 13-an de aprilo.

7.30 h.: ellitiĝo.

8.15 h.: matenmanĝo.

9.00 h.: trankvila promenado tra Leiden.

11.00 h.: **Komuna Diservo** en la Hooglandse Preĝejo, se eblas antaŭe aŭ poste kaftrinkado. Tiuj, kiuj nepre ne volos viziti preĝejon, povos viziti la „Lakenhal” muzeon.

13.00 h.: lunĉo en la kongresejo.

14.30 h.: dua prelego kun diskutoj aŭ forumo pri aktuala temo, poste anoncota. Intertempe te-trinkado.

16.00 h.: Edifa fino de la semajnfina konferenco.

16.30 h.: Oficiala fermo.

Jam anoncis sin membroj de tri unuigoj. Tre volonte ni bonvenigas eksterlandajn gastojn.

Anoncu vin kie eble plej baldaŭ ĉe: fam. Koopmans, Vendelstraat 10, Leiden.

Nur post ĝiro de f 10,— je poŝtĝironto nr. 62 43 47 je la nomo de W. H. Koopmans, „Malgranda Paradizo”, Vendelstraat 10, Leiden, vi estos enskribita.

Dum la konferenco mem mi devas peti de vi ankoraŭ malgrandan sumeton pro la elspezoj por stencilado de programoj k.t.p.

Instigu min per baldaŭa aliĝo kaj pago kaj mi certigos vin, ke vi ne bedaŭros ke vi anoncis vin por la **unua ekumena renkontiĝo de Esperantistoj en Nederlando**.

Jelly Koopmans-Schotanus.

AĈETU VIAJN LIBROJN ĈE LA LIBRO-SERVO L.E.E.N.
Borniastraat 95 Leeuwarden

Ĉiam servopreta - stoko laŭeble kompleta

Librolisto por la E-diplomo

Pro la fakto ke la libroj el kiuj la E-kandidatoj povas elekti sian studverkon, preskaŭ ne plu estas haveblaj, la ekzamena komitato decidis aldoni la libron:

„Rakontu Samideano”, eldono de la Dansk Esperanto-Forlag.

La eldonistoj invitis diversnaciajn Esperantistojn kontribui al la enhavo de la verketo. El la enkondukita parolo ni citas:

„Mi supozas ke oni volonte legas pri la interesaj spertoj per Esperanto kiujn havis aliaj. Ni supozas ke la rakontoj estas bonega materialo por konversacio kaj klub- kaj kurslaboro”.

La libro estas havebla ĉe la libroservoj de niaj asocioj, kaj la prezo estas f 4,50. Krome ni atentigas la studentojn (kaj kursgvidantojn) pri la fakto ke ankaŭ la antaŭe elektitaj libroj estas ankoraŭ al-lasataj por la E-diploma ekzameno. La listo el kiu oni povas elekti estas do:

1. Esperanta Krestomatio
2. La Verda Koro (Baghy)
3. Tra la Mondo (Bennemann)
4. Rakontu Samideano.

Kiel pagi internacie

Ĉiuj nederlandaj posedantoj de poŝtĝir-konto ricevis (aŭ ricevos) broŝureton, kiu informas kiel oni povas profiti tian konton.

Sub n-ro 6 oni tre mallonge sciigas, ke ankaŭ eblas pagi internacie per poŝtĝiro. Multaj kompreneble sciis tion, sed mi ankaŭ spertis, ke ekzistas personoj, kiuj ankoraŭ ne estis informitaj pri ĉi tiu ebleco.

Oni povus supozi, ke personoj kiuj uzas Esperanton kiel plej facilan internacian komunikilon, ankaŭ por internacia pago uzas la plej efikan pagmanieron. Ofte tamen oni ankoraŭ en Esperanto-revuoj k.t.p. legas pri pagado per ekz. internaciaj respondkuponoj, vere tre multtekostaj pagiloj! Ili kostas po gld. 0,50 kaj valoras ĉie malpli.

Sed certe ofte ekzistas la ebleco pagi pli facile. El nia lando ekz. oni povas pagi per poŝtkonto al la sekvaj landoj: Aŭstrujo, Belgujo, Danujo, Finnlando, Francujo, Hispanujo, Italujo, Japanujo, Kurasao, Luksemburgo, Maroko, Okcident-Germanujo (inkluzive de Okcidenta Berlino), Svedujo kaj Svisujo. H. G.

La aŭtoroj kaj tradukintoj de la „Ideala Esperanto-Biblioteko”

En „N.E.” de februaro 1968, p. 17, ni aperigis artikolon „Kiu povas informi nin?” pri la aŭtoroj kaj tradukintoj de la verkoj, kiuj aperis en la „Ideala Esperanto-Biblioteko”, eldonita de la Presejo „Helmond” en Helmond. Por tiuj kiuj ne plu havas ĉi tiun numeron, mi ripetas la titolojn:

1. Blua sango, de Willy Wood, trad. de Willy van Zoest.
2. La Morea perlo, de D. Simson, trad. de R. Delpasko.
3. Irisis, de H. t Sas, trad. de P. Ch. M. van de Vijver.
4. Sub la vitra kupolo, de V. L. van Weddingen, trad. de M. Groels.
5. La radianta lotuso, de J. D. Degreef, trad. de P. van de Vijver.

Danke al informoj, de diversaj flankoj ricevitaj responde al tiu artikolo, mi nun povas rakonti iom pli pri aŭtoroj kaj tradukintoj.

Willy Wood estas la pseŭdonimo de Henri t Sas († 1966), kiu ankaŭ verkis „Irisis”. La identeco de Willy Wood kaj Henri t Sas ankaŭ evidentiĝas el la fakto, ke en la anonco sur la lasta paĝo de „La Morea perlo” kiel verkinto de „Irisis” estas menciita Willy Wood. En la aperinta verko tamen oni mencias kiel verkinton Henri t Sas.

S-ino L. de Jong-Roobeek el Boskoop informis min, ke ŝi posedas ankoraŭ bibliotek-katalogon, en kiu Willy Wood estas menciita kiel aŭtoro de Blauw Bloed, Irisis, kaj krome de De Moord van Monta Madonna, De Man zonder Geheugen, De Vrouw die liegt, Het giftige Hout, evidente ĉiuj popularaj romanoj.

Henri t Sas estis ĵurnalisto, dum pluraj jaroj redaktoro de „De Nieuwe Eeuw”, romkatolika revuo, fondita en 1917. Dum la mobilizo 1914-1918 li verkis noveletojn pri la soldata vivo.

Willy van Zoest estas la pseŭdonimo de f-ino M. Groels, tiama anino de la sekcio Eindhoven de Nederlanda Katolika Unuiĝo Esperantista.

Pri R. Delpasko, tradukinto de La Morea perlo, ni jam sciigis en „N.E.” de julio/aŭg. 1968, p. 64, ke ĝi estas la pseŭdonimo de P. A. Schendeler, konata figuro en la Katolika Esperanto-movado en Nederlando.

P. Ch. M. van de Vijver, ankoraŭ loĝanta en Eindhoven, tre afable informis min pri diversaj sciindaĵoj. Li verkis Esperanto-lernolibron kaj estis membro de la Ekzamena Komitato.

V. L. van Weddingen estas la pseŭdonimo de V. (= Valentijn) Latte.

Van Weddingen estas la familia nomo de lia edzino. Sub tiu pseŭdonimo li verkis romanojn kaj porknabajn librojn. Dum dudeko da jaroj li laboris ĉe la eldonejo De Spaarnestad en Haarlem.

La lastajn jarojn de sia vivo - li mortis en 1967 en Schoten-Antwerpen - li laboris ĉe la eldonejo „Libelle” en Antwerpen. V. Latte estis esperantisto, kiu dum multaj jaroj korespondis kun amikoj en Japanujo, Sovet-Unio, Rumanujo, Bulgarujo k.t.p. Li ankaŭ instruis la internacian lingvon.

La identecoj de J. D. Degreef kaj D. Simson estas ankoraŭ ne klarigitaj, almenaŭ la informoj pri ili estas tro necertaj.

Arnhem.

H. Groendijk.

KONCIZE

De la redaktoro

Tiu ĉi estas la lasta numero de Nederlanda Esperantisto kiun mi redaktis. En januaro de la venonta jaro aperos la Komuna Esperanto-Gazeto. Dezirante al ĝi multan sukceson mi profitas ĉi tiun okazon por danki ĉiujn bonvolajn gelegantojn kaj speciale tiujn kiuj per siaj kontribuoj faciligis mian taskon ĉe la redaktado.

H. G.

T.E.J.O.

Tutmonda Esperantisto Junulara Organizo (TEJO) okazigis de 25 ĝis 31 aŭg. 1968 sukcesplenan kadrokurson (vidu raporton en „N.E.” de oktobro 1968, p. 84).

La komitato por eksteraj rilatoj de TEJO (Kastelenstraat 231, Amsterdam-Z., tel. 421853) nun informis nin, ke oni sukcesis kontaktiĝi kun grava belga institucio „Fondaĵo Lodewijk de Raet”, kiu en la estonteco aŭspicias la ankoraŭ okazantajn kadrokursojn de TEJO. TEJO nun enketas pri la deziroj de eventualaj partoprenantoj.

Abonprezo „Norda Prismo”

En anonco en la novembro numero de „N.E.” estas menciite, ke la abonprezo por „Norda Prismo” estas gld. 10,—.

Intertempe ni ricevis informon, ke la abonprezo estas plialtigita ĝis gld. 11,15. La libroservo, reprezentante la revuon, petas al tiuj, kiuj jam pagis la abonon por 1969, aldoni ankoraŭ la kromsumeton.

ĈU „WINNIE THE POOH” EN ESPERANTO?

Oni intencas eldoni en traduko de s-ino D-rino Kellerman Reed la laŭdire amuzoplenan infanlibron „Winnie la Pu” de la angla aŭtoro A. A. Milne, kiu plezurigis jam generaciojn - ĉu infanojn, ĉu gepatrojn.

La eldononto tamen antaŭe deziras iun certecon pri la demando, ĉu la merkato por la libro estos sufiĉe granda. Tial siavice via libro-servo sin turnas al vi, kun la peto al interesitoj antaŭmendi la verkon. La vendoprezo estos verŝajne inter f 14,20 - f 16,20. Al antaŭmendintoj la libro-servo liveros la libron sen aldone de afranko. Bonvolu informi plej-senprokraste kaj almenaŭ antaŭ la venontaj Kristnaskaj festotajoj. La libron ornamos la pli ol 100 originalaj desegnaĵoj de E. H. Shepard.

De la intereso inter la esperantistoj dependos, ĉu la libro estos eldonata.

Antaŭmendu ĉe

Libro-Servo L.E.E.N.
Borniastraat 95, Leeuwarden.

Interŝanĝado de sonbendleteroj

„Sonbendamikoj Esperantaj” estas klubo speciale por personoj kiuj havas magnetofonon kaj deziras korespondi per sonbendletero. Ĉiuj estantaj membroj! Ĉiuj estontaj membroj! Ni petas vin skribi al ni kaj sendi la ĝustajn detalojn pri via nomo, adreso, magnetofono kaj ĉefintereso, por ke ni povu presigi tiujn detalojn sur la nova ĝisdata listo de nia klubo. Al novaj estontaj membroj mi volonte sendos detalojn pri:

„Sonbendamikoj Esperantaj”,
HORLEY, SURREY, BRITUJO.

NEDERLANDA ESPERANTO-ASOCIO „LA ESTONTO ESTAS NIA”

Prez.: S-ro J. Calado, Vergeet-mij-nietstraat 25 b, Rotterdam-12.

Tel.: 0 10 - 18 94 81.

Sekr.: S-ino J. C. Heetkamp-Sensius, Hengelolaan 5f, 's-Gravenhage.

Tel.: 0 70 - 66 96 69.

Kasistino: S-ino W. P. Lok-van Putten, Brederodelaan 36, Santpoort, (Z.).

Tel.: 0 25 60 - 76 15.

Poŝtĝirkonto: 3 45 63 je la nomo de: Alg. Penningm. Ned. Esp. Ver.

L.E.E.N., Brederodelaan 36, Santpoort-Zuid.

Efika informado pri Esperanto

La 26-an de oktobro okazis konferenco pri ĉi tiu temo en restoracio „De Plasmolens”, Rotterdam. La konferencejo situas bele apud la Kralingena lago. Ĉe bela vetero ni estus ankoraŭ multe pli ĝuintaj la tagmezan promenadon en la Kralingena arbaro.

Parolis s-ro André Bourdeaux, ĉefo de la franca informa fako. Laŭ li la ĉefaj postuloj al gazetara ataŝeo de Esperanto estas: kono de la ĉefaj faktoj de la Esperanto-movado, tiel la bazaj faktoj kiel ĉiuj gravaj novaĵoj, dispono pri fotoj, kontakto kun la gazetara mondo kaj kono de la ĉefaj vojoj por atingi la informajn mediojn, kono de la ĉefaj argumentoj por kaj kontraŭ Esperanto, pacienco, memoro, takto kaj elokventeco.

La gazetoj ricevas 90% de la novaĵoj de la gazetaragentejoj. Oni do devas esti akceptata de la gazetaragentejoj. La informoj por ili estu ne pli ol dekliniaj.

Agante laŭ tiuj gvidlinioj s-ro Bourdeaux sukcesis krei konstantan kontakton kun la franca gazetaro, per kiu li ofte publikigas novaĵojn pri Esperanto en la journaloj. Mi esperas, ke FEN baldaŭ fondos same kompetentan gazetaran servon kun similaj konstantaj rilatoj kun la gazetaro.

La ĉefaj argumentoj kontraŭ Esperanto estas ĝia artefariteco, ĝia manko de kulturo, la granda fakta potencpozicio de la grandaj naciaj lingvoj, la maljuniĝo de la Esperanto-movado kaj ĝia malbelsoneco. En la posttagmezo oni diskutis pri argumentoj kontraŭ Esperanto.

Pro la neĉeesto de kontraŭulo la diskuto iĝis iom ŝajnbatalo.

En la vespero okazis distra programo. Nin tre ĉarmis la japana edzino kaj bebo de s-ro Pompilio. Akito Nagata en la japana surprizo ofte hezitis kaj malbone prononcis.

D-ro W. A. Verloren van Themaat.

AĈETU VIAJN LIBROJN ĈE LA LIBRO-SERVO L.E.E.N.

Borniastraat 95

Leeuwarden

Ĉiam servopreta - stoko laŭeble kompleta.

Reprezentanto en Nederlando por:

HEROLDO DE ESPERANTO, la memstara gazeto aktuala kaj informa. Abono f 15,—

NORDA PRISMO, la kultura, socia kaj literatura kvaronjara revuo. Abono f 10,—

Libro-Servo L.E.E.N., Leeuwarden. Poŝtkonto 76915.

